1-a Jaro, N-o 42

APERAS S.A.T. SEMAJNE

16. Julio 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz | Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

## La laborista movado en Aŭstrio

Speciale verkita por "Sennaciulo" de deputitino *Emmy Freundlich, Wien.*

Ekzistas certe malmulte da organizaĵoj laboristaj en la mondo, havantaj en lastaj jaroj tiel ŝanĝan sorton kiel la aŭstria klaso laborista. Se la laboristoj aŭstriaj tamen povis konstrui fortan organizaĵon ĝuste en tempoj de plej severa mizero ekonomia, ili dankas tion al la fakto, ke ili en la antaŭa ŝtato aŭstria devis lukti kontraŭ grandaj malfacilaĵoj intern-politikaj. En la estinta Aŭstrio kunevivis dekunu nacioj de tre diversa evoluo kultura. En lando, enhavanta tiom da diferenciĝoj kulturaj kaj naciaj, krei laboristan movadon, postulas multe da forto intelekta, ne nur de la kamaradoj kondukantaj sed ankaŭ de la amaso de l' organizitoj. Krom la naciaj malfacilaĵoj ni devis ankaŭ venki la reakciecon de la elektorajto, kiun ni povis modernigi nur 35 jarojn pli poste ol la germanoj, kiuj ĝin ricevis tuj ĉe fondiĝo de l' germana imperio. En tiu batalo senekzempla, kiu daŭris preskaŭ 30 jarojn kaj en kiu ni akiris tiun unikan rajton politikan, spite la kontraŭagoj de absoluteca klaso regista, kaj kiun ni kondukis per uzo de inteligento, forto organizita kaj disciplino severega, la aŭstria klaso laborista multon lernis praktike, kion ne povis lerni laboristaj movadoj elkreskintaj en ŝtatoj demokratiaj, ekz. la angla. Malmoderna leĝo pri unuiĝoj, la manko de l' elektorajto, la arbitreco de l' ŝtata administrado kaj la reakcieco de duonabsoluteca ŝtato militista, devis esti venkataj, por atingi politikan moviĝeblecon por la klaso laborista. La leĝo pri societoj kaj unuiĝoj estis farita kontraŭ la libereco de l' unuiĝoj, sed ni sukcesis, la paragrafojn tiel interpreti, ke ili povis esti ŝanĝataj rimedo por la alteniĝanta popolamaso. Dro. *Viktor Adler,* la granda kondukanto en la unuaj tri jardekoj de la batalo por la ŝtata egalrajto kaj ŝtabo de spirite altestarantaj kunlaborantoj konstruis la fundamenton, sur kiu povis bazi laboristoj aŭstriaj hodiaŭ siajn grandajn organizaĵojn nevenkeblajn. Hardita per la batalo, la klaso laborista dum la milito malgraŭ la plej severa gazetar-cenzuro kaj malgraŭ la fakto, ke oni sendis la plej grandan parton de la partianoj en la tranĉeojn, ne ĉesis lukti kontraŭ la milito kaj la ŝtato reakcia.

Ne estis facile, kontraŭ la militista fortopovo sukcese atingi la rajton pri agadoj kontraŭ la milito; nur kiam en jaro 1917a ekŝancelis la fundamentoj de l' ŝtato kaj sekve de l' fortopovo militista, la klaso laborista povis tutenergie redaŭrigi la batalon pro paco. En januaro 1918a estis la grandaj strikoj en la munici-fabrikoj, ekkomencis inter la militistaro la interligiĝo de la konfiduloj por pretiĝi kontraŭ ĉiu ebla uzurpo, intencota de la militistaj estroj en horoj de malespero. Kiam en aŭtuno 1918a komencis la granda renversiĝo de la frontoj kaj sekve tiu de la ŝtato malnova, la klaso laborista, unuanima kaj preparita, ekkomencis la batalon por la konstruo de nova kunestado ŝtata.

Aŭstrio nova estas malgranda lando nacie unueca. Ĝi alportis al la laborista klaso aŭstria la liberiĝon el ĉiuj malfacilaĵoj naciaj. Sed la nekomprenemo de la packonferenco en Paris fuŝkonstruis la ŝtaton tiamaniere, ke ni ne havas karbon en ĝi, ne havas sufiĉe da greno kaj kampofruktoj por nutri la enloĝantojn; kruda materialo kaj nutraĵoj plejparte devas esti importataj. Tiu ĉiama importo plimultekostigas la vivkondiĉojn de la popolamaso kaj kaŭzas prezplialtiĝon nekontraŭlukteblan per rimedoj normalaj. Aliflanke la industrio aŭstria, sole kapabla per ampleksa eksporto pagi la importon de vivrimedoj, perdis sian klientaron, ĉar la novaj ŝtatoj ĉirkaŭ ĝi ekestiĝintaj, malpermesis la importon de komercaĵoj aŭstriaj. Altaj limimpostoj kvazaŭ dorndrataĵoj ĉirkaŭas nin kaj kaŭzas senokupatecon konstante pliakrigantan la staton ekonomian. Tiu ĉi vivmalebleco de l' ŝtato unue montriĝis per kompleta ruiniĝo de la valuto. Tiun oni en Ĝenevo en tute laika maniero volis "sanigi" per prunto de la Ligo de Nacioj, sed la pli lasta nun ĉiam pli kaj pli klare vidas, ke la krizo de la valuto ne estis tia de ŝtato, sed de la ekonomio politika, kiun oni ne povas forigi per financaj subtenadoj sed nur per alhavigo de nova granda eksportebleco. Tiu ĉi ekkono postuligas la laboristaron aŭstrian je l' unuigo kun Germanio, per la pacintertraktadoj por longa tempo malebligita, ĉar sen eksportejo nia industrio ne povas vivi. La "aŭstria demando" ĉiam pli kaj pli fariĝas demando eŭropa, ĉiuokaze solvota, se oni ne volas, ke Aŭstrio fariĝu la komenco de novaj politikaj malfacilaĵoj internaciaj.

En tiuj ŝanĝplenaj tempoj, dum kiuj unu ekonomia krizo sekvis la alian, la laborista klaso devis lukti por la ekkonstruo de ŝtato demokrata kaj kontraŭ tendencoj, ĝenantaj la unuecon de la laboristaro. Dum la unuaj monatoj post la renverso la malfacilaĵoj ankoraŭ pliakriĝis per la absoluta neekzistado de nutraĵoj. La enloĝantoj devis vivi je tagporcio de duon-

funta pano, semajna porcio de 20 gramoj da graso aŭ sebo kaj 25 dekagramoj da faruno, en ĉambroj nehejtitaj kaj nesufiĉe lumigitaj. La amasoj revenantaj de la estinta armeo, ne nur konsistantaj el germanoj, sed ankaŭ el ĉeĥoj, poloj, madjaroj kaj aliaj popolanoj, minacis fari en la lando ĥaoson. La ŝtata potenc-organizo tute renversiĝis. La estroj de la venkitaj armeoj ne kuraĝis eniri la kazernojn, la nova ŝtata ordo nun devis esti kreata. En tiuj tempoj la sola, kiu ne cedis, estis la organizaĵo de la laboristaro. Niaj sindikatoj povis influi la grandegajn amasojn de la senokupatoj; la politika partio per laboristaj konsilantaroj sukcesis lukti kontraŭ disigaj influoj kaj devigi la novan opozicion, partopreni la interkonsiliĝojn de la laborista klaso. Eĉ tiuj, kiuj kunvivis la tiamajn tempojn, ankaŭ nun ne facile povas kompreni, kiel entute estis eble, superi la grandegan amason da laboro, tiel subite plenumotan de la laboristaro. Ĉar la danĝero ne nur konsistis en la poamasa alkuro de neorganizitaj, malsatiĝintaj, malesperantaj homoj, sed ankaŭ en la trostreĉo de la junaj sentoj de libereco kaj la forto, fine liberigita de ĉiuj ĉenoj de antikviĝinta ŝtataŭtoritato. Ne estas la merito de niaj kondukantoj klare pensantaj kaj respondec-konsciaj, — estas la granda merito historia de niaj miloj da konfiduloj, plenumintaj en tiuj jaroj superhomaĵon en la servo de siaj organizaĵoj. Ili estis la fera falango, je kiu rompiĝis ĉiuj komplikaĵoj, kaj kiu la sola ebligis konstruadon de nova ŝtato el ĥaoso de renversinta. La edukado de nia konfidulo eble estas la plej granda tasko, kiun plenumis la aŭstria klaso laborista. Neniu alia lando en la tuta mondo havas tiel bone ellaboritan, ĝis en detalaĵoj organizitan aparaton kiel la aŭstria socialdemokrataro. De la domkonfidulo, konanta kaj kontrolanta siajn samdomanojn, kaj la laborejkonfidulo, mastrumanta la laborejon kaj konanta ĉiun laborkamaradon aparte, ĝis la parti-estraro kaj la sindikata komisiono estas seninterrompa vico de interligoj, kiuj ebligas, la dezirojn, zorgojn kaj bezonojn de la amaso ĉiutage kaj ĉiuhore transdoni al ĉiuj kamaradoj kondukantaj. Se Aŭstrio tiel malpli multe devis diskuti pri la problemo de l' kondukantoj ol aliaj partioj politikaj de eksterlando, ĝi tion ŝuldas al la priskribita organizado, de Dro. Bauer nomita "funkcia demokratio".

Tiu ĉi konfidulaparato ne nur estas la forto kaj potenco de la klaso laborista de Aŭstrio, ĝi ankaŭ estas la fundamento, sur kiu ĝi konstruis sian propran remparon respublikan kontraŭ ĉiuj atakoj de interna kaj ekstera reakcio: la Respublika Ŝirmligo.[1]) La laboristaroj, ne travivintaj revolucion, ne ĉiam povas ĝuste taksi la gravecon kaj signifon de ĉi tiu organizaĵo, — oni ofte ĝin rigardas deflankiĝo de pacifismo, por kiu luktas la tutmonda klaso laborista, kaj kredas, tiel konstruita organizaĵo revivigas la instinktojn militistajn. Ni spertis, en Aŭstrio kaj en Germanio, ke eĉ tre impresa limigo de la oficiala armeo ne malhelpas la armigon de burĝaro. La sekvoj de faŝismo, sin montrantaj en la plej multaj landoj de Eŭropo, postulas, ke la laboristaro en la necertaj tempoj, sekvantaj necesege la revolucion ĝis la konsolidiĝo de la novaj ŝtataj cirkonstancoj, provas altigi sian defendokapablon. La Respublika Ŝirmligo estas organizaĵo ne konstante armita, sed en momento de bezono tuj armigebla. Kiam la hungara kontraŭrevolucio provis, la Burgenland, kiun al ni destinis la packontrakto, rekonkiri, tiam la taĉmentoj de la Respublika Ŝirmligo kune kun la aŭstriaj militistoj ŝirmis la limon kaj multaj kamaradoj dum tagoj kaj noktoj ne senvestiĝis, defendantaj la respublikon kontraŭ atakoj de ĝiaj klasmalamikoj. En Wien la laboristoj estas kapablaj, dum malmultaj horoj pretigi taĉmenton de 70—80000 viroj. Ĉe ĉiuj grandaj demonstracioj, strikoj danĝeraj kaj aliaj bataloj de la laboristaro, la Respublika Ŝirmligo, niaj ordigistoj, estas la efektivaj protektantoj de la libereco kaj certeco de laboristoj. Sen tiaj organizaĵoj ni ne povus ŝirmi la novan konstitucion respublikan.

Movadon de tiu amplekso kaj signifo en modesta artikolo priskribi estas neeble. Sed kiam la universala Esperanto-Kongreso laborista okazos en Wien, ni estas konvinkitaj, ke, same kiel la aliaj eksterlandaj kamaradoj, ankaŭ la Esperantistoj estos plenigataj de kontentiĝo kaj ĝojo pri la organizaĵo, konstruita de la laborista klaso aŭstria.

Trad. *Moko*

[1]) Vidu la artikolon en n-ro 9 kaj 10 de „S".

## Argentinaj "Bonoj"

La senlaboreco en Buenos Aires ĉiutage pligrandiĝas ĝis la ekstremo ke, kiam mastro bezonas laboriston, li publikigas en ĉiutaga ĵurnalo "mi dungos unu laboriston", kaj sekvantan tagon sin prezentas amasego da dungotaj laboristoj por okupi tiun oficon.

Hodiaŭ frumatene mi vidis konkretan fakton. Ĉe St. Rivadavia n-o 1555 "Garaĝe" estis tiu anonceto, kaj centoj da laboristoj ĉeestis por ke ili estu dungotaj, kaj sole unu estis dungata.

Se ĉi tio okazas sole en unu domo: kio estos okazanta ĉe dungagentejoj?

Eĉ burĝa ĵurnalo publikigis bildon pri tia sceno. Estas rimarkinda fakto, ke tia sin okupas pri laboristaj mizeroj. Devas esti "bonegaj" vivkondiĉoj de la laboristaro, ĉu ne?

*SAT-ano 3418.*

**ALIĜU AL LA V. KONGRESO!**

# La demokrata respubliko Aŭstrio

**Speciale verkita por "Senn." de SAT-ano n-o 2364**

(Fino)

### III. Laborkondiĉoj

Estas konata afero ke troviĝas en Aŭstrio la plej mizeraj salajroj. Komparite kun la salajro de la Londona laboristo, ĉe ni la laboristo nur gajnas 47 % de la salajro de la Londona laboristo. Sed tiu ĉi cifero nur validas por la profesiaj laboristoj. La senmetiuloj kaj la virinoj, gejunuloj ricevas pli malaltan salajron. La metiistoj ricevas proksimuman salajron de 30—40 aŭstriaj ŝilingoj.[1]) Senprofesiuloj ricevas salajron de 25—35 ŝilingoj. La salajroj de la virinoj kaj junuloj estas inter 15—25 ŝilingoj. Sed ekzistas multaj laboristkategorioj, kies laboristoj ne gajnas tiom "multe". Ekzemple ĉe la teksejlaboristoj, ledlaboristoj ekzistas salajroj de 9—15 ŝilingoj. Precipe virinoj ekzistas multaj en tiuj ĉi metioj, kiuj gajnas nur 9—12 ŝilingojn. Eĉ profesilerninta junlaboristo ricevas en la ŝuindustrio 13—18 ŝilingojn laŭ la kontraktoj. La prezoj de la vivbezonaĵoj estas altegaj, eĉ pli karaj ol en aliaj landoj, kie laboristoj ricevas pli da salajro. Ekzemple virvesto mezbona kostas 150 ŝilingojn, paro da mezbonaj ŝuoj 28 ŝilingojn, virĉemizo 14 ŝilingojn, tritikfaruno po kg preskaŭ unu ŝilingon, pano unu kg 0,8 ŝilingon, 1 l. da lakto 0,5 ŝilingon, 1 kg da terpomoj 0,4 ŝilingon, 1 kg da sukero 0,9 ŝilingon. 2 ovoj 0,3 ŝilingon, 1 kg da butero 7 ŝilingojn. Per tiuj ĉi ciferoj ĉiu kamarado mem povas kalkuli, kiel bone aŭstria laboristo povas vivi, kiu eble posedas grandan familion. Estas vere ke ekzistas malgranda parto de la laboristaro, kiu gajnas pli altan salajron. Sed la granda plimulto vivas per tiaj salajroj.

2. La laborkondiĉoj ricevas siajn aspektojn per la vorto pliintensivigo de la laboro, kiu ĉiam estas elparolata de la kapitalistoj. Pliigon de la laborefikoj la entreprenantoj postulas de la laboristoj plimalfortigitaj per la vivcirkonstancoj dum- kaj postmilitaj kaj per la nuna mizera vivo. Ili intencas elpremi la ostocerbon de la laboristoj per tiu ĉi signaldiro. La samaj mizeraj maŝinoj, — kaj anstataŭ dekhora, okhora labortago, kaj tamen oni atingis ĝis nun jam la jenon: Ĉe la konstrulaboristoj oni intensivigis la laborefikon je pli ol 100 %, ĉe la ŝuistoj la entreprenanto nun postulas la duoblan laboron dum ok horoj, kiel antaŭmilite dum dekunu horoj. Ĉe la ĉapelistoj nuntempe la kapitalistoj postulas anstataŭ kiel antaŭmilite dum dekhoroj 65 pecojn da duonpretaj neformitaj ĉapeloj, dum ok horoj 120 pecojn, kaj tion oni povas konstati en ĉiuj metioj. La kapitalistoj sciis, kiamaniere helpi sin, ili pligrandigis la nombron de la laborinstigistoj kaj atingis per tio bonegan

1) 7 ŝilingoj aŭstriaj estas unu dolaro usona.

profiton. La fabrikkonsilantoj en la lasta tempo ne plu povas batali, kiel estus necese kontraŭ tiaj agoj, ĉar ankaŭ la leĝo pri la fabrikkonsilantoj estas akre atakita de la kapitalistoj, kaj okazis ke oni elĵetis fabrikkonsilantojn el la laborejo, se ili defendis la laboristojn. Se ili venis al la arbitracia tribunalo, ili ankaŭ ĉe ĉi tiu ne ricevis sian rajton. La fakto estas, ke la kapitalistoj klopodas atingi la belan tempon kiam malantaŭ la laboristoj staros la majstro aŭ konfidenciulo de la entreprenantoj, kiu pelos la laboristojn al la laboro elsuĉante la lastan forton el la ostoj en la intereso de la ekspluatado.

### IV. Faŝismo

Lasttempe oni povas rimarki, ke nova kuraĝo kaj vivo eniris en la faŝistajn vicojn pro la elekto de Hindenburg en Germanio. Unu kunvenon de la faŝistaj taĉmentoj tuj sekvas alia. Unufojon la kunveno nomiĝas inaŭguro de flago de iu katolika junulorganizaĵo, duan fojon revidfesto de veteran-unuiĝo, sed ĉiam oni povas konstati la agemon de tiuj faŝistaj bandoj. En la lastaj tagoj de la monato majo unu el tiuj "sendanĝeraj festoj" de la naci-socialistoj (hokkrucanoj) postulis viktimon de la laboristaro. K-do Müller, urbkonsilanto, membro de la soc. dem. partio, mortis kiel viktimo de la kugloj de tiuj faŝistoj. Li ne estis la unua viktimo. Jam kelkaj kamaradoj estas fimortigitaj de tiuj friponoj. Ankaŭ ĉi-fojon la laboristaro postulis severan punon. Sed kion oni devis konstati? — La registaro arestigis socialistajn laboristojn. Oni povis klare vidi, kiel la registaro subtenas la faŝistojn, kaj certigite pri la helpo de la registaro ili ĉiam denove antaŭenpuŝas kontraŭ la laboristoj. Ĉe tiu ĉi okazo oni memoras pri la fimortigo de nia k-do Still. La fimortigintoj de tiu ĉi kamarado ricevis nuran monpunon de dek aŭstriaj ŝilingoj, kvazaŭ ĉasmono por la oficiala permeso de la fimortigo. Alia okazintaĵo, hokkrucano mortigis tre konatan ĵurnaliston de Vieno en la propra kancelario. Kio okazis? Oni deklaris la fimortiginton kiel freneza. Kaj nun komparu la juĝojn kontraŭ la laboristoj, senlaboruloj, kiuj pro sia malsato ekmarŝis sur la stratojn por krii la mizeregon, kiun ili suferas, al la oreloj de la registaroj kaj burĝoj, ricevas pro tiu ĉi "krimo" ok monatojn da karcero, malgraŭ ke ili jam ricevis batojn per sabro sur la kapon. Laboristaj junuloj, kiuj kantas laboristan kanton, ricevas dekkvar tagojn da karcero. La gazeto de tiu ĉi bando publikigis liston da homoj plejparte socialistaj funkciuloj sub la titolo "La Rathenau'aj 300". Rathenau'on la faŝistoj fimortigis, kaj ĉi tiu alvoko signifas nenion alian, ol alvokon por ankaŭ mortigi ilin. La organo de la kom. partio estis konfiskita, ĉar ĝi alvokis senarmigi la banditojn. La organo de la hokkrucanoj povis aperi kun alvoko al fimortigo. El tiuj ĉi malmultaj ekzemploj estas klare videble, ke registaro kaj faŝistoj frate kunlaboras. Ne povas esperi la laboristaro justecon de tiu ĉi registaro kontraŭ la faŝistaj krimoj. Nur la laboristaro mem povas helpi sin kaj malebligi en la estonteco tiajn krimojn.

### V. Senlaboreco

Pri tiu ĉi temo vidu mian lastan artikolon en n-o 31 de "Senn." Mi nur volas aldoni, ke pro la lasta demonstracio la registaro malpermesis la centran senlaborulkomitaton. Je komenco de junio oni forprenis al multaj senlaboruloj la subtenon kaj al multaj oni plimalgrandigis la subtenmonon. La 6. junio okazis demonstracio de la militinvalidaj senlaboruloj. Amasoj da policanoj estis ĵetataj sur la straton, por forpeli kaj forbati la plej malriĉajn de la malriĉuloj, kiuj sidis sen piedoj kaj sen brakoj sur la reloj de la tramvojo en la interna urbo antaŭ la parlamento. Nature ne estis bela aspekto por la amuzpromenantaj burĝoj, vidi la pro pano kaj laboro kriantajn militinvalidajn senlaborulojn sen brako kaj piedo. Pro tio ankaŭ la policanoj rapidis forigi tiujn ĉi malbelaĵojn el la okuloj de la bonaj burĝoj. Ke tio ne estis ebla sen bati kaj arestigi multajn, estas memkomprenebla afero.

---

## La "faŝistaj" leĝoj

*Tri novaj reakciegaj leĝoj: kontraŭ la oficistoj, kontraŭ la parlamenta povo, kontraŭ la ĵurnalaro. – La voĉdonado pri la leĝoj. – La aprobo de l' Senato*

Ni jam skribis al vi pri la leĝo kontraŭ la "kaŝaj asocioj" [1]). Nun la itala parlamento, dum nur du tagoj (19. k. 20. VI.), aprobis tri pluajn reakciegajn leĝojn.

Laŭ la unua, ĝis 31. XII. 1926, la registaro rajtas eksigi ĉiujn kaj ĉiajn, ĉiurangajn militajn kaj nemilitajn ŝtatajn oficistojn, kiuj per iaj ajn agadoj elmontros "sian malemon al la ĝeneralaj politikaj direktoj de la registaro". La eksigitaj oficistoj havantaj sian oficon de post almenaŭ 15 jaroj, ricevos sian laŭleĝan pension: la aliaj ricevos po 1/12 da sia jara pago je ĉiu oficjaro. Kontraŭ la eksigo mem oni ne rajtas plendi. Komprenebie, tiu leĝo koncernas eĉ la oficirojn, la juĝistojn ktp. La dua leĝo rajtigas la registaron, ke ĝi faru leĝojn, pri multaj temoj, sen antaŭa parlamenta diskutado, kiam ĝi opinias, ke "tio estu urĝa". Tio signifas, ke la parlamento estas efektive senigita grandparte de siaj ĉefaj rajtoj!

Laŭ la tria leĝo, ĉiu ĵurnalo devas havi respondan redaktoron, estanta nek deputito nek senatano, kiu estu akceptita de la ĝenerala prokuroro de la koncerna duagrada juĝistaro *(Corte d' Appello)*. La ĵurnalo devas sciigi al tiu prokuroro ankaŭ la nomojn de siaj posedantoj, ĉar tiuj ĉi, kune kun la eldonisto kaj kun la presejposedanto, estas respondaj pri la pagendaj monpunoj. Rajtas labori nur la ĵurnalistoj, kiuj aliĝis al la t. n. "Ordeno de la ĵurnalistoj" (la *ordenoj* estas speco da korporacioj, kiel la o. de la advokatoj, de la kuracistoj, ktp). Plue "Estos punataj per 6-monata ĝis 3-jara malliberejo, kaj per monpuno de 2000 ĝis 10000 italaj liroj [2]) tiuj, kiuj, sciante pri ilia nevereco, presigos malverajn aŭ ruze aliigitajn informojn, kiuj povus domaĝi la nacian krediteblon en- aŭ eksternacie, aŭ maltrankviligi la italanaron, aŭ malhelpi la publikan ordon, aŭ domaĝi la diplomatian agadon de la registaro kaj la interrilatojn kun la eksterlando." (*Laŭvorta tradukado.*)

La leĝon pri la "oficistoj" aprobis 274 deputitoj (faŝistoj, liberalreakciuloj, kaj katolik-reakciuloj): malaprobis 42 (komunistoj, liberaloj, dekstraj demokratoj, t. n. militintoj). Ne ĉeestis 219, plejparte apartenantaj al la t. n. "Aventino".

La leĝon pri la "senparlamenta leĝfarado" aprobis 250 deputitoj, malaprobis 37. Ĉiuj kontraŭregistaraj deputitoj ne ĉeestis la voĉdonadon pri la "ĵurnala leĝo", kiu ricevis 261 favorajn kaj nur 5 (eble ŝercajn) kontraŭajn voĉojn.

Ĉar per antaŭa leĝo la registaro estis ankaŭ rajtigita aliigi la civilan, komercan kaj kriminalan leĝarojn, tial la faŝista registaro iĝis nun preskaŭ aŭtokrata, ĉiopova.

Sed la Senato fermis sin ne diskutinte kaj aprobinte ĉi tiujn leĝojn, eĉ ne la leĝon "kontraŭ la kaŝaj asocioj": kaj ĝi rekunvenos nur dum novembro . . . Tial la tuta "faŝistrevolucia leĝaro" ankoraŭ ne funkcias. —

Ĉu la registaro pacience atendos ĝis novembro? Ĉu ĝi aplikos sian *leĝaron* per reĝa dekreto, kiun ĝi poste aprobigos de la Senato? Dume, la timigita malgrandburĝaro pli-malpli laŭte *zumas* . . .

*Sennomulo*

---

## Estonteco de SAT

Ni ne tro argumentu *pri* SAT, sed laboru *por* ĝi. Longaj diskutoj tedas la komencantojn. En Britio nia porpropaganda asocio BLES helpas SAT k. „Senn.". Laŭ mia opinio SAT pioniros kaj propagandos sennaciismon per Esp., ĝis la Laboristaj Internacioj alprenos nian ilon kaj vidpunkton. Komuna lingvo kaj idealo ne sufiĉos kiel daŭra bazo efektiva — Necesas ekonomia funkcio. Ni semas; la mondlaboristaro rikoltos.

## Nun kaj Poste

Londonanoj hodiaŭ (24. 6. 25) ĝojas vidante 45 militaeroplanojn facile flugantajn super la urbegon. Kion la posteuloj enspirante venengason frakasite de bomboj en la venonta milito diros?

---

Senkaŝe la britaj karbmastroj atakas 8-horan labortagon kaj la kompanioj fervojaj proponis malaltigi la salajrojn de siaj dungitoj.

---

[1]) S-ulo n-o 37.

[2]) Unu itala liro egalis, la 21. VI., ĉirkaŭ 0.19 svisajn frankojn.

# Krizo de Dawes-Plano

En la fino de junio okazis en Bruselo konferenco de l' Internacia Komercŝanĝo. Pro la temo tie diskutita, ĝi havas grandan signifon por la proletaro de ĉiuj landoj. Tiu temo estis: Efekto de Dawes-Plano.

Sed ĉu tiu-ĉi ne estis jam delonge akceptita? Ĉu la entente'a komisaro ne registrigas ĉiumonate sumojn, ricevitajn de la germana registaro, aŭ pli vere, elpremitajn de la germana laboristaro? Tamen, malgraŭ ĉi-tiuj faktoj la plano devinta feliĉigi homaron krakas! Kaj tion devas konfesi burĝaj ekonomistoj kaj eĉ kunkreantoj de la plano mem.

Kial do ĝi krakas?

Ĉiu, eĉ nemulte komprenanta ekonomiajn problemojn scias ke la plano de Dawes povas nur funkcii, kondiĉe ke eksporto superas importon, t.-e. ke Germanio havas aktivan bilancon. Ĉar nur en tiu-ĉi okazo ĝi povus amasi sufiĉe da kapitalo por pagi siajn reparaciajn ŝuldojn. La dua kondiĉo estas ke Germanio trovos sorbeblecan merkaton por siaj eksportaĵoj.

Kaj kion konstatis la ekspertizistoj en Bruselo? Ke komence de "Dawes-sanigado "de Germanio, la pasivo de la ekstera komerco atingis la sumon de 3 miliardoj da markoj oraj, kaj sole en majo 1925 — 266 milionoj da mk. or. Se eĉ Germanio povus eksporti, ĝi tute ne havas sorbeblecajn landojn por si. Usono fermis siajn limojn per altaj impostoj kaj ankaŭ en Sud-Ameriko ĝi ne volas havi germanan konkuradon. Tia sama afero estas kun Grandbritio kaj siaj kolonioj. Nun, Francio ne scias mem kien eksporti vendaĵojn, kaj kompreneble ĝi ne povas pace toleri germanan eksporton. Kaj Unuiĝo de SSR estas fermita pro pure politikaj kaŭzoj, dank' al miopa politiko de la germana registaro ne eluzanta la favorajn kondiĉojn de la Rapallo'a traktato.

Kion do fari? Oni ne povas ja eksporti al Nordpoluso?

Ni eĉ supozu ke Germanio havas aktivan bilancon kaj ke ĝi laŭ la plano povas pagi 2½ miliardojn ĉiujare; tiu-okaze nek Usono, nek Britio nek Francio akceptus tiun grandegan sumon, ĉar ĝi ruinigus la valutan bazon de ĉi-tiuj landoj.

La klaskonscia laboristaro konprenis ne nur kion signifas la ĉenoj de Dawes por ĝi, sed ankaŭ antaŭvidis, ke ĉi-tiu plano ne povas esti efektivebla pro pure ekonomiaj kaŭzoj, ĉar ĝi estas kontraŭdiro en si mem.

Kaj se nun unu el plej gravaj kaj konataj financ-ĵurnaloj en New-York antaŭ kelkaj tagoj skribis: "... ĉe ni ne estas plu sekreto, ke nur tre nesignifa progreso estas atingita per la Dawes-Plano sur la vojo al la definitiva ekonomia resanigo" — oni tuj komprenas ke tiuj-ĉi esprimoj celas kaŝi, sed samtempe pruvas *kompletan malsukceson de la Dawes'a ideo.* Nun, eĉ aŭtoroj de la plano estas devigataj konstati, ke ĝi kondukas la ekonomian evoluon de Eŭropo en seneliran situacion.

Ĉi-tiu situacio nepre venos. Montri al la popoloj la elirvojon — estos la historia tasko de la proletara klaso. *Observanto*

# Ribelo en Albanio

"En suda Albanio komenciĝis la ribelo, organizita de partianoj de eks-ĉefministro Fannoli. La gvidanto de l' ribelo Kemal-Brioni estas subtenata de multaj albanaj elmigrintoj, revenantaj el Italio" ... Tiel komunikis ĵurnala telegramo el Vieno. Sub tiuj ĉi avaraj vortoj estas kaŝita la esenco de nun daŭranta interlukto de imperialistoj pro Albanio. Pasis malpli ol unu jaro de kiam en tiu ĉi lando okazis "laŭvica revolucio" kaj jen denove ĉirkaŭ tiu ĉi landeto densiĝas politika atmosfero, en kiu ĝermas internacia konflikto. Por ĝin kompreni necesas rememori kelkajn faktojn el la enlanda kaj internacia situacio de Albanio.

En la lando loĝas nur 832 mil da diversgenta popolo: 585 mil mahometanoj, 158 mil ortodoksaj kristanoj, 89 mil katolikoj. La religia kaj nacia malsameco de l' enlanduloj sur fundo de l' ekonomia stagno kaj feŭdala sociordo fertiligas[1]) la grundon por oftaj kaj daŭraj malpacoj en Albanio. Sendube, la albana popolo trovus sufiĉe da propraj fortoj por eliri sur la vojon de l' ekonomia progreso, se grandaj kaj malgrandaj balkanaj landoj pro siaj rabaj interesoj ne instigus unu grupon de loĝantaro batali kontraŭ la alia.

La forta magneto de Albanio kiu altiras al si diverslandajn imperialistojn, estas ĝia strategia situacio. Kiu posedas Albanion, kun ĝiaj havenoj Skutari kaj Valono, tiu havas komandan punkton por tuta Balkano, la ŝlosilon por Adriatiko kaj bonegan bazon por ŝiparo en Mediteraneo.

Jen kial grandpotencaj kaj eĉ pigmeaj imperialistoj de Balkano (Grekio kaj Jugo-Slavio) avide etendas siajn manojn al Albanio. Krom tio ĉi en Albanio estas eltrovita *nafto,* kiu ludas gravan rolon en internacia politiko.

Ĉiuj ĉi faktoroj antaŭdestinis tiun landon esti internacia areno, sur kiu renkontiĝas malsamtendencaj interesoj de eŭropaj imperialistoj. „Se Balkano estas pulvejo de Eŭropo, tiam Albanio estas brulanta ŝnuro por ĝin eksplodigi" — diris iu sprita ĵurnalisto.

Ĝis 1925j. la lando estis regata de Fannoli, kiu pli frue estis renversinta la regadon de Aĥmed Zogu. La partio de Fannoli reprezentis la interesojn de vilaĝaj bienuloj kaj progresema etburĝa inteligentularo. Laŭigante sian politikon konforme al imperialistaj interesoj de Italio, registaro de Fannoli elmontris iom progreseman karakteron de sia enlanda politiko. Jam post iom estis realigataj agraraj reformoj kaj la politiko de nacia sendependeco. Fine estis restarigitaj diplomataj rilatoj kun Sovet-Unio, kaj rusa ambasadoro k-do Krakovecki venis en Albanion. La lasto incitis la grandajn kaj etajn imperialistojn. Angla burĝaro, por kompensi sian pasivecon dum 8 monata regado de Makdonald, kun neordinara energio aktivigis la tutan fronton de sia kolonia politiko. Por kaŝi la tendencojn de angla imperialismo, angla burĝa ĵurnalaro furioze ekbojis pri danĝero de Kominterno. Inspirante ankaŭ Italion kaj Jugo-Slavion, nuna registaro de Anglio arogis postuli ekzilon de rusa ambasadoro el Albanio. Samtempe Jugo-Slavio kontakte kun instigoj de Anglio armis bandojn de eksreganto Aĥmed Zogu, reprezentanton de agraraj feŭdaloj t. n. "begoj". Eksterlande preparita "ribelo" renversis la registaron de Fannoli. Kvankam rusa ambasadoro en komenco de l' konflikto estis devigata forveturi el Albanio, tamen invado de Aĥmed Zogu ne estis haltigita. Post tiam ne plu sufiĉis la preteksto, ke la ĉeesto de k-do Krakovecki en albania ĉefurbo Tirano helpas okazeblon de eventualaj malordoj kaj klasluktaj konfliktoj. Jugo-Slavio estis malkontenta pro radikala programo de agraraj reformoj, projektitaj de Fannoli. Malkontentaj estis ankaŭ anglo-usonaj serĉistoj de nafto, kiu dum regado de Fannoli ne estus rabe eksportebla el Albanio. Rezulte en Tirano, sub oficiala nomo "registaro", ekregis bando de Aĥmed Zogu, kiu fakte fariĝis agentaro de Jugo-Slavio kaj ĝiaj protektantoj. La progreseman politikon de Fannoli nun anstataŭis "afera" politiko de nova dungito Aĥmed Zogu, kiu celis nur vendi sin kaj sian landon al eksterlandaj imperialistoj. Dum tiu "revolucio" en Albanio ne estis tute divenebla la karaktero de raba kontrakto inter Chamberlain, Herriot kaj Mussolini. Sed poste evidentiĝis, ke Chamberlain malhonte trompis siajn kolegojn ...

Post kuna preparado de kolektiva rabado, la koncesio por albanaj naftejoj estis ricevita nur de *anglaj* kapitalistoj! Por Italio kaj Francio restis nur amikaj dankesprimoj kaj aliaj samspecaj valoraĵoj de l' diplomatio. Nature la burĝa ĵurnalaro de tiuj landoj kaj de Usono indigne malaprobis tiun perfidan konduton de anglaj imperialistoj. Tiu ĉi presvorta protesto antaŭsignis novan konplikiĝon de l' demando pri Albanio. Nun, kiam Francio estas okupita pri Maroko, Anglio — pri malakutigo de antagonismo kun Usono, Italio estas agresema rilate al Albanio. Por itala imperialismo taŭgas la malnova rimedo: okazigo de l' revolucioj kaj ribeloj en la lando, kiu devas fariĝi propra kolonio. Pro tio refoje estas subtenata la partio de Fannoli, kiu povas sukcesi en la ribelo se Italio ne renkontos fortan kontraŭstaron de alilandaj imperialistoj. Tio ĉi lasta estas la demando de proksima futuro. Krom ĉio ĉi, la nuna stato de albania demando atestas pri malstabil-

1) fruktodonigas

eco de postmilita situacio en tuta Eŭropo. Hieraŭaj kunbatalantoj kontraŭ Sovet-Ruslando, obtenintaj malestigon de ĝia influo en Albanio, nun kaŝe luktas unu kontraŭ la alia . . .

La aktualiĝo de balkana demando kaj eventualaj konfliktoj pro ĝi inter grandpotencaj regnoj malfermos la okulojn al multaj proletoj. La lastaj scios vidi la verkarakteran laboron de Ligo de Nacioj (kies ano estas Albanio), bonintencajn agojn de anglaj bankistoj kaj la tutan falsecon de nuna "epoko de pacifismo" . . .

*N. Krassovski.*

# Portugalio

## La socia batalado akriĝas

*Perfidmortigo de laboristoj. – Strikoj. - Okhora labortago. — La demokrata kongreso*

Du laboristoj estis perfidmortigitaj en Lisbono post kapto, kiam oni ilin kondukis al kaptitejo, sub la preteksto, ke ili forkuris. Ĉi tiuj du krimoj okazis en malsamaj tagoj. Unu estis trafita en la brusto — forkurante! — kaj la alia estis preskaŭ blinda pro malsano, kaj la krimo okazis en dezerta strato. Oni malpermesas la publikigon de A BATALHA, pro ĝia varma kondamno de tiu krima fiago.

* * *

En Setúbal, pro kapto de l' ĉefredaktoro de VOZ SINDICAL (Sindikata Voĉo), oni strikis dum kelkaj tagoj. Malgraŭ la energio de l' strikintoj, oni ne liberigis nian k-don. La laboristaro revenis al laboro sub promeso de l' distriktestro liberigi lin post fino de l' striko.

Kiel protesto kontraŭ la persekutoj kaj ellandigo en malsanigan kolonion, sen antaŭa juĝo, de laboristoj, okazis striko en Lisbono. Dum ĝi, la policistoj pafis sur laboristojn, kiuj pace invitis k-dojn forlasi la laboron. Strikis domkonstruistoj, metalurgistoj, kelkaj tipografiistoj kaj nur kelkaj laboristoj el aliaj industrioj. La striko, deklarita de l' Sindikata Laborĉambro (eks-Unuiĝo de Laboristaj Sindikatoj) devis ĉesi pro manko de disvastiĝo.

* * *

Denove, la ŝtato publikigas regulon al dekreto pri okhora labortago. Belega . . . sed tiuj klasoj, kiuj ne kapablos postuli ĝian plenumon, daŭrigos labori 10 kaj 12 kaj eĉ pluajn horojn! La regulo estas nur — ĉiela muziko . . .

* * *

La demokrata partio, cetere ĉiam la plej reakciema respublika partio, kies kongreso ĵus okazis — ekspozicio de politikaj mizeraĵoj — elektis konserveman estraron, malgraŭ la ĉeesto de maldekstrula partianaro. Ĉi tiun fakton oni ŝuldas al politika lerteco de l' konservemuloj, kiuj tiele voĉdonis — pro stomakaj principoj . . .

*832*

**Diskutu la kongres-proponojn!**

# DISKUTEJO

## Pri reformo de la SAT-organizacio

*Kvankam la ĉi-suba artikolo estas plena je misaj, erarplenaj kaj plej evidente sofistaj argumentoj, ni tamen decidis ĝin publikigi por ke nia legantaro povu juĝi mem pri la senbazeco de la riproĉoj, kiujn direktas al la SAT-organizsistemo la* internacianoj.

*Tre verŝajne tiu artikolo venigos detalan rifuton. Tial hodiaŭ ni volas nur peti la legantojn, ke ili mem eltrovu la erarojn kaj miskomprenojn per atenta legado kaj pripensado.*

*Ni profitu la okazon por deklari, ke neniam SAT celis detrui la nacilingvajn organizaĵojn. Nenie en la kolektoj de S. R. kaj de S-lo oni povus trovi "oficialan" diron, kiu malpravigus tian aserton. Sekve oni notu, ke la k-doj Kolŝinski kaj 2921 parolis je sia propra nomo kaj sub sia persona respondeco. Se ni estas iel riproĉindaj, eble estas pro tio, ke ne sufiĉe ni insistis por ke ĉiuj SAT-anoj estu ankaŭ membroj de nacilingvaj asocioj, por ke tie ili malhelpu, ke tiuj asocioj ne konkurencu SAT-on per eldono de esperantlingvaj verkoj aŭ gazetoj, unuvorte per* apliko *de esperanto, dum ilia rolo devas esti limigita je la nura varbado al esperanto per* nacilingvaj rimedoj. *Se ĉio ne funkcias bone en la esperanta movado, tio rezultas de la fakto, ke la fakiga spiritostato ne sufiĉe enpenetris niajn rondojn.*

*Sed, kompreneble, la SAT-anoj de iu ajn nacilingva teritorio povas alpreni la solvon de k-doj Kolŝinski kaj 2921, se tio plaĉas al ili. SAT oficiale ne enmiksiĝas en tiuj aferoj.*

*Ankoraŭ unu rimarkon: ni almenaŭ plene konsentas kun k-do Sproeck en lia respondo al k-do Sheriff. Ne nur en LEA la sperto montris ke malsampartianoj, sed samcelanoj, povas tre bone interkonsenti pri la poresperanta propagando farenda en laboristaj rondoj, same pri la apliko de esperanto.* E. K. de SAT

La lastatempe en "Sennaciulo" aperintaj artikoloj pri ŝanĝo de la organiza formo de SAT ne estu nerespondataj de mi. La fakto, ke povas aperi tiaj planoj, pruvas, ke la reorganizo estas necesa, ke io estas ŝanĝenda. *Kaj vere, montriĝis,* ke la nuna formo ne respondas al la bezonoj, eĉ pli, ke ĝi kontraŭas al la bezonoj. Ni konstatas la fakton, ke en la landoj (aŭ lingvoregionoj) ekzistas propagandaj asocioj, ke mankas la internacia kunfando de tiuj asocioj. Tamen ekzistas SAT. Sed ĝi ne estas nek volas esti la internacio de la laboristaj Esp. organizacioj. Sur ĝia standardo ĝi skribis la propagandon de sennaciismo, la predikon de sennacieca pensmaniero. En si mem sennaciismo ja estas afero tute memstara, kiu kvazaŭ hazarde kunligiĝas kun Esperanto, ĉar kompreneble sennaciismo per naciaj lingvoj estus sensencaĵo. Sed eĉ sennaciismo per Esperanto ne estas pli multe ol bela teorio, ĝi signifas la konstruon de domo, komencata ĉe tegmento, forgesante la murojn, la fundamenton. La nuna socio kun siaj politikaj limoj ne lasas nei sin. Ĝi persekutas nin de la ellitiĝo frumatene ĝis vespere ĉe ekdormo. Pensmaniero sennacieca povas ekzisti nur teorie, nur en nia koro.

Ke elsekiĝis la ideo de sennaciismo, tion pruvas ankaŭ la organo de SAT, "Sennaciulo". Nenion oni trovas en ĝi laŭ vidpunkto sennacieca. La gazeto raportas pri nacioj, pri vivo de laboristoj en Anglio, pri strikoj en Norvegio, pri Germanio, pri Rusio.

Kie oni uzas la sektorojn, la "tabu" de SAT? Ili estas ankrigataj en la statuto, ili estas bezonataj, por — — elekti sektorestrojn. Kaj ĉiam ĉe novelekto oni denove sciiĝas, ke — — jes ja, SAT partiĝas ne laŭ landoj, sed laŭ sektoroj. Ne ekzistas pli granda ridindaĵo ol tiuj sektoroj. Eĉ teorie ili ne estas pravigeblaj. Ĝar neniam estiĝos socio, kiu dispartiĝas laŭ tiaj sektoroj. Kompreneble, iam foriĝos la nunaj limoj, sed la nova socio faros limojn laŭ la ekonomiaj interrilatoj.

La praktiko ankaŭ montris, ke ne estas eble, dispartigi la movadon laŭ "por" — aŭ "per" Esperanto. La laboro peresperanta nuntempe nur havas etan (eĉ nulan) valoron peresperantan. La laboro peresperanta valoras poresperante, por la propagando.

Ekkoninte tiujn faktojn ni rigardu la reformplanojn de k-doj Kolĉinski, n-o 2921 kaj Sheriff. Ĉiuj postulas la likvidiĝon de la nunaj propagandaj asocioj. Kaj ĉiuj montras, ke ili ne ĝuste ekkonis la strukturon de la nunaj landaj ligoj, aŭ — — ke ili ĉerpis siajn spertojn el lokaj aŭ unulandaj cirkonstancoj.

Ekz. la plano de k-do Kolĉinski estus praktika, se — — la ligoj alilandaj same kiel la sovetrusia estus komunistaj. Sed la aliaj ligoj konsistas el anoj de diversaj partioj, de malsamaj opinioj ne pri la celo, sed pri la vojo. SAT nun havas laŭ opinio de multaj kamaradoj fortan inklinon al Komintern. Ni ne esploru ĉi tie, ĉu prave aŭ ne, tiun "onidiron" oni atentu. Ĉar se oni ne atentas, tiam ĉe likvidigo de la prop. ligoj kaj transigo al SAT granda parto — verŝajne eĉ la pli granda parto restus ekstere, konsekvence fondus novan ligon. Kaj do ni ne atingus nian celon, unuigi la movadon.

Strangan opinion havas k-do Sheriff. Li kredas, ke ne estas ebla la kunlaborado de diverspartiaj kamaradoj. Certe la spertoj en la grupoj de "LEA germanlingva" montris, ke bone povas kunlabori la kamaradoj. Kompreneble en la alipartia kamarado oni ne vidu krimulon, sed nur aliopiniulon, kiu ankaŭ havas la firman kredon, ke lia vojo estas la ĝusta.

Se ni per ŝanĝo ne povas atingi, ke ĉiuj laboristaj kamaradoj de tuta mondo povas kuniĝi sur komuna fundamento, tiam reformo ne estas valora, tiam ni restu ĉe la nuna stato. La ĝisnunaj planoj ja celis fortigon de SAT, sed ili ne volas grave ŝanĝi la statuton. Kaj do — nekonsekvence — ili postulas, ke foriĝu la nunaj prop. ligoj, ke reaperu ili kiel "fakoj" de SAT. Pardonu, sed tio ne estas solvo, eĉ se ĝi estus ebla. Ĉar fakoj estus tute ĥimeraj formaĵoj, kies ekzisto ne estus malpermesata, sed kiuj ne havus rajton en la gvidado de la tutmonda organizacio. Tamen tutprave ili povas postuli tian rajton.

Dispartigo de peresperanta kaj poresperanta laboroj ne estas ebla. Do an-

kaŭ dispartigo de organizacioj laŭ tiu vidpunkto ne estas necesa nek utila. Ĉiu parto de la organizacio plenumu sian rolon: La grupo propagandas, kaj instruas, la distrikto propagandas en sia regiono, zorgas pri fondo de novaj grupoj en lokoj, kie ili ne jam ekzistas. La Asocioj de la lingvaj regionoj (kiuj tre ofte koincidas kun la landoj) liveras materialon por propagando kaj instruado: broŝurojn, flugfoliojn, lernlibrojn. La internacia ligo kunigas la tutmondan lab. esperantistaron, peras informojn el la tuta mondo, zorgas pri eldonado de internacia literaturo. En tia organizacio la internacia ligo ne pli ne malpli plenumas ol nun plenumas SAT.

La praktikado de frateco internacia (sennacieca) jam nun okazas: kamaradoj el eksterlando kore estas akceptataj, vigla korespondado interligas la tutmondan Esp. laboristaron.

Nepre ni devas alkutimiĝi al la praktiko. Nepre ni devas ekkoni, ke ne utilas, revadi pri ideoj, pri fantaziaĵoj; nur la ekkono de la ĝusta, de la praktika vojo antaŭenhelpos nin, plifortigos nin.

La simpla akcepto de ia paragrafo, kiu permesas la fondon de propagandaj fakoj, ne povas helpi nin. Utila nur estas fundamenta reorganizo, kiu okazu tiel, ke ĉiuj lab. Esperantaj organizacioj povu aliĝi. Ni ne forgesu, ke la fondo de internacio certe okazos. Kaj se SAT ne ekkonas tion, se ĝi ne zorgas, ke la kunfando internacia okazu kun ĝi, tiam ĝi spertos, ke *spite* SAT fondiĝos internacio. Kaj tia posta ekzisto de du internaciaj organizacioj certe ne estas stato dezirinda, ĝi signifas por SAT, ke ĝi perdos grandan aron da membroj, ke estonte ĝi nur vivetos.

Ne necesas, hodiaŭ aldoni jam plenan planon por nova statuto. Ni nur volas unue enĵeti vovan ideon en la diskutadon, post la interkonsento pri la vojo irota ni havos tempon por priparoli la detalojn.

*A. Sproeck.*

---

*Respondo al artikolo de k-do* R. Louzon, *felietono n-oj 34/35 pri "komunisma ekonomio".*

Mi pensas, ke la problemo pri "starigo de socio el produktantoj laborantaj libere kaj ricevantaj saman salajron por sama laboro" estas jam delonge majstre solvita de *Henri Ĝorĵ*[1]. Mankis nur tiu kiu ĝin povus efektivigi. Nuntempe ĝi jam ekzistas — ĝi estas U.S.S.R. Mi atentigas al vortoj de Curjupa: "Kiel ne alloga estas la projekto pri imposto nur de tio, kio estas ricevita ne per laboro — tamen ĝi ne povas esti efektivigita dum 1925—26 buĝeta jaro".

Mi ne dubas pri la efektivigo de "sol-imposto" kaj solvo de suprenomita problemo en daŭro de 3 aŭ 5 jaroj en U.S.S.R.

*J. Brukson (1896).*

---

### Solvoj de la problemoj el n-o 40

1) Vi-n-tro; 2) mono-fero (mon-ofero);

3) Blanka la kampo,
Nigra la semo.
Kiu ĝin semas,
Tiu komprenas. *Letero.*

4) Libero.

1) Rigardu la libron: Progreso kaj Malriĉeco.

# TRA LA KLASBATALO

La rifkabiloj venke atakis la francajn poziciojn kaj minacas Taga, Tanger kaj Fez.

La tri faŝistaj studentoj germanaj estas mortkondamnitaj de Moskva tribunalo.

Anglio preparas helpe kun aliaj potencoj intervenadon en Sovet-Unio.

Je invito de la ĉina sindikata federacio la Centra Soveto de l' profunioj de USSR decidis sendi delegitaron al Ĉinio.

La situacio en Ŝanĥajo estas neŝanĝita. La grandaj fabrikejoj ne plu ricevas elektron.

---

## Unu prezaltiĝo sekvas la alian!

Dum la lastaj monatoj kelkfoje plialtiĝis la prezoj por presado, papero ktp. Taksante la situacion de nia membraro kaj legantaro, ni ĉiam hezitis, plialtigi la tarifon, kvankam tio estus la normala sekvo, tute justa kaj tute natura. Ni eĉ ne unufojon dekomence de la aperado de "Sennaciulo" plialtigis la prezojn lastjare fiksitajn. Neniu alia entrepreno estas elteninta tion! Kompreneble ni venis al la *limo de kapablo*. Komparu la prezojn de aliaj esperantaj gazetoj, komparu la kvaliton kaj riĉecon de l' enhavo, kalkulu, kiom ni liveras al vi por la pagata sumo, kaj tiam juĝu! Ekkonu, kiom ni cedas al niaj abonantoj, por ke ili ne suferu troan monelspezon. Tamen ni devas ankaŭ fari al la legantaro niajn kompensajn postulojn. Ni ne volas elsuĉi pli da mono el ili, sed ni ja devas postuli, ke ili helpu al ni balancigi la financan situacion. Kaj tio estas ebla. Ekzistas taŭga vojo, por aranĝi la aferon, t. e.

### plialtigi la nombron de abonantoj

Certe tio postulas klopodojn de nia kamaradaro, sed ĝi donas al ni la garantion, ke ni povos daŭrigi liveri la gazetojn je sama malkara prezo. Do ni direktas al vi la jenan parolon:

### Ĉiu abonanto varbu unu novan!

Ĉiu varmiĝu, entuziasmiĝu por tiu parolo, ĝi estu ĉies penso kaj aspiro, ĝin efektivigi ĉiu trovu rimedon kaj vojon! Kamaradoj, zorgu por la bono de via gazeto!

---

### Invito

Gekamaradoj kongresontoj. La Dresdena Lab. Esp.-istaro aranĝos tuj post la kongreso internacian propagandmitingon. Pro tio ni petas la gekongresontojn el Rusio, Latvio, Finnlando, Polio, Svedio ktp. traveturi Dresdenon kaj partopreni je la mitingo. Por jam prizorgi la necesajn loĝejojn, anoncu vin kiel eble plej baldaŭ ĉe ni. La SAT-peranto de Dresdeno partoprenos la Van kongreson. Gek-doj, montru fratecon, solidarecon kaj helpu al ni plivastigi nian lingvon.

Por la SAT-anaro Dresden
*Reinh. Lehmann, Dresden 6, Förstereistr.* 25

# *Inter ni*

*"Senvole ni tendencas, kiam oni parolas al ni fremdan lingvon, enmeti en la aŭditaj vortoj sonojn al niaj oreloj familiarajn kaj intimajn. Tiel, ekzemple, la Germano faris en la pasinta tempo el la vorto* arcubalista *kiun aŭdis li, la vorton* Armbrust (*arbalesto). Niaj sentoj mem rezistas kaj malsimpatie rilatas al kio estas nova; ĝenerale, en la plej simplaj procesoj de la sentokapablo, jam* superregas *pasioj, kiaj estas la timo, la amo, la malamo, enkalkulante tiun pasivan pasion, la mallaboremon."* [1])

*Tiu eldiro de l' profundpensa filozofo Nietzsche (Nitĉe) estas vera kaj konstatebla la fakto ne nur rilate lingvajn sonojn, sed multfake. Se ni, ekzemple, atente observas la spiritostaton de kelkaj SAT-anoj, ne nur de kiuj kvazaŭ enŝteliĝis en nia organizaĵo kun la kaŝita celo aliigi ĝian spiriton, sed de sinceruloj bonintencaj, ni povas kelkfoje konstati, ke en la vorto* sennaciismo *ili simple metas la sencon de internaciismo.*

*Kaj miriga tio ne estas. La sennaciisma koncepto estas ja tro nova, ne sufiĉe klarigita por ke ĝi povu esti ĝuste komprenata kaj mense alcelata. Por percepti ĝin, necesas konstanta streĉado intelekta, kiu kvazaŭ eltiras nin el la hodiaŭa marĉo, el la senĉesaj influoj naciecaj, en kiuj ni kvazaŭ baniĝas.*

*La sennaciisma ideo povis naskiĝi nur en la epoko, kiam ekzistas mondlingva movado jam sufiĉe forta. Sed ĝi ne povis ne naskiĝi. Tiu nova koncepto enkutimiĝos tre malrapide kaj nur en la movado kiu aplikadas esperanton, profite al la proletara klaso, t. e. en SAT.*

*Ni ne forgesu, ke la antaŭa ŝtupo, la internaciismo, ne ankoraŭ estas mense atingita de la plimulto el la homoj. Kaj neforgesinde estas, ke eĉ en la internaciistaro troviĝas multaj senkonsciaj naciemuloj.*

*Tamen nur blindaj ŝovinistoj ne vidas, ke vole nevole la mastrumado de l' mondo jam devas obei pli malpli la internaciisman principon. La ĉiuspecaj filistroj kiuj denuncas kaj abomenas la "internacian kapitalon", la "internacian spekulacion" ktp. nur disfamigas la ekziston de iu nehaltigebla fluo, de iu neforigebla fakto.*

*En la jaro 1864 fondiĝis la 1. Internacio. Do, pli ol sesdek jaroj jam forpasis de kiam la tiamaj "utopiistoj" proklamis la necesecon por la laboristaro sin organizi super la landlimoj. Hodiaŭ la internaciismo estas ĉe la sojlo de l' venko. Kaj jen postvenas malforta, apenaŭ pensebla koncepto: la* sennaciismo. *Estu for ĉiuj limoj, ĉu ŝtataj, landaj, regnaj, lingvaj! . . . Mondekonomio, mondlingvo, mondmastrumado . . .*

*Sed la entuziasmuloj sin gardu kontraŭ iluzioj. La internaciistaro, kiu cetere ne ankoraŭ tutvenkis, ne estas preta sekvi novan ideofluon. Sed kiu pli klare vidas la malproksiman celon, tiu devas pionire marŝi unuavice, ne atentante la malkuraĝulojn, kiujn timigas neesplorita regiono. La veraj SAT-anoj devas penadi venki tiun "pasivan pasion", la intelektan mallaboremon, pri kiu parolis la mondfama Nitĉe.* Iuelie

---

### Atentu Naturamik-Esperantistoj!

Responde al diversaj ricevitaj demandoj ĉiuj naturamikaj esperantistoj estu atentigotaj al la "Responda letero" de la Organiza Komitato de Esperantista Olimpiada Komitato k-do Naber, Frankfurt a. M, en n-o 41 de "S".

Tiuj k-doj, kiuj vizitos la SAT-kongreson en Wien, krom la ĉefa anonciĝo ĉe k-do Slezak, pro aranĝo de naturamika esperanto-konferenco ankaŭ dum la kongreso, anoncu sin ĉe k-do *Alfred Klein, Wien II,* Pazmanitengasse 10/21.

*Centralo de la naturamikaj Esp-o-Sekcioj* en komisio: *Peter Klopfleisch,* ĉe k-do L. Puff, Frankfurt a. M. Schwalbacher Str. 64 II.

1) El "Trans la bono kaj la malbono".

# V. Kongreso de SAT

## Wien, 11.—15. aŭgusto 1925

### 5. Komuniko.

**Kongresejo:** Laborista hejmo XVI, Kreitnergasse.

**Kongresadreso:** Jos. Slezak, XX, Ospelgasse 34/25.

**Kongreskotizo.** La simpla membrokotizo de SAT por la diversaj landoj. Senlaboruloj post atestita senlaboreco pagas la duonon.

**Pago** per naciaj monbiletoj en registritaj leteroj.

**Aliĝoj.** Validaj estas nur aliĝiloj akompanataj de la kotizo. La aliĝilon tekstu legeble laŭ jena ordo: 1) familia nomo, 2) antaŭnomo, 3) aĝo, 4) profesio, 5) strato kaj n-o, 6) urbo, 7) provinco, 8) lando, 9) SAT-membromatrikulo. Aliĝi povas ankaŭ ĉiu laboristo espista (ne-SAT-ano). La aliĝkotizo estas la sama kiel por la SAT-membroj.

**Loĝigo.** Por prizorgi la konvenajn loĝejojn, estas necese, ke la gek-doj mendu plej eble frue la deziritan ĉambron, ĉu privatan, ĉu hotelan ktp.

Gekamaradoj! Ne prokrastu la sendon de via aliĝilo. Se vi mem ne povas veni, tamen subtenu nin per via aliĝo.

*La prepara komitato de la V-a.*

**Al la Wienaj laboristoj-esperantistoj.**

Ĉiuj gek-doj Wienaj, kiuj povas disponi liton aŭ ĉambron al eksterlandaj k-doj, estas urĝe petataj anonci tuj la kondiĉojn al la prepara komitato.

**4. listo de aliĝintoj**

| | | | |
|---|---|---|---|
| | | **Aŭstrio** | |
| 88 | K-do | Schürrer, Karl, Wien | 1688 |
| 89 | „ | Spoljarić, Josip, Wien XII | 3951 |
| 90 | „ | Revo, Lucien, Wien IV | 1267 |
| 91 | „ | Tischler, Otto, Wien II | |
| 92 | „ | Klein, Alfred, Wien II | |
| 93 | K-dino | Deutsch, Sofie, Wien II | |
| | | **Britio** | |
| 96 | K-dino | Limouzin, E., Londono | 509 |
| | | **Germanio** | |
| 94 | K-do | Deubler, Konrad, München | 30 |
| 95 | „ | Wolfrum, Christian, Nürnberg | 882 |
| | | **Rusio** | |
| 97 | K-do | Klys, Jan, Minsk | 4104 |
| 98 | „ | Peterlejter, Kaziko, Minsk | 4436 |
| 99 | „ | Rejhert, Minsk | 4996 |
| 100 | „ | Judin, Elio, Minsk | 4602 |
| 101 | „ | Proĥarĉik, Petro, Minsk | 4430 |
| 102 | „ | Kirjuŝin, Paŭlo, Minsk | 4425 |
| 103 | „ | Kukelka, Jan, Minsk | |
| 104 | „ | Snejko, Dimitrij, Minsk | 603 |
| 105 | K-dino | Klys, Adela, Minsk | 5056 |
| 106 | K-do | Ŝevĉugov, N, Omsk | 4133 |
| 107 | „ | Zamjatin V., Buryca | 4967 |
| 108 | „ | Aleksandrov, P., Stalingrad | 5210 |
| 109 | „ | Modesto, Urban, Leningrad | 5089 |
| 110 | „ | Lidin, Ivan, Kazanj | 41 |

**Propono n-o X**

Anstataŭigi la artikolon 27 de la nuna statuto per la jena teksto:

“Ĝi esploras la diversajn proponojn pri la “agado de la venonta jaro:

“a) la Kongreso rajtas decidi definitive “pri propono konforma al la celo de la “Asocio, esprimita en la artikolo I de la “statuto.

“b) aproba decido de la Kongreso pri “propono ne konforma al la statuto, vali-“das nur post konfirmo de la ĝenerala voĉ-“donado.

“c) se la Kongreso malaprobas proponon “ne konforman al la statuto, ĉi propono “estas prezentebla al ĝenerala voĉdonado “nur laŭ la kondiĉoj de la artikoloj 30, 31, 32.

*(La Ekzekutiva Komisiono de SAT).*

**Propono n-o XI**

La administrejo eldonu 2 pecojn da glumarkoj kun surskriboj: “Letera respondo pagita“ kaj “Poŝtkarta respondo pagita“; ili estu vendotaj po 0,25 resp. 0,15 mk. Ĉiu informpetonto havigu al -si kaj aldonu tiajn SAT-respondmarkojn al informpetoj. Nur tiamaniere oni povos plenumi § 39 ĉ kaj de la SAT-oficejoj estos evitataj ŝarĝantaj afrankokostoj. La respondmarkoj estu akceptotaj de la administrejo kiel pagiloj. *4154.*

# KRONIKO

**Ĉekoslovakio**

*Gablonz a. N.* La ĉi-tiea SAT-grupo partoprenis je la ruĝa tago en Grünwald a. N. Ni portis nian flagon kaj kantis batalkantojn dum la demonstracio. Sur la festplaco ni kantis la “Internacion“ kaj la “Himnon“ kun la nova revolucia teksto. Kvankam ni ne ĉiam povas gajni novajn membrojn, ni tamen per nia publika montrado instigas la homojn, gekamaradojn interesi por Esperanto kaj tiamaniere vigligi, pligrandigi la Esp.-movadon. Ni disdonis flugfoliojn, afiŝis multajn gazetojn sur diversaj lokoj ktp. Ni povis esti tute kontentaj pri la sukceso.

**Francio**

La Va Kongreso de la Fédération Esp. Ouvrière (F.E.O.) unuiĝo de la franclingvaj proletaj grupoj esp., okazis en Lyon, dum pentekosto. Ĉeestis 56 gek-doj el 12 grupoj aŭ izoluloj; 5 el grupoj kiuj ne reprezentigis sin kaj 3 alilandaj naciaj asocioj sendis salutleterojn. La kongreso aprobis la sekretarian kaj kasistan raportojn, kaj la raporton de k-do Robert, gvidanto de la perkoresponda kurso. Estis decidite, ke la grupoj, kiuj organizos perkorespondan kurson, devos nepre uzi la federacian materialon (lernolibrojn kaj cirkulerojn) kaj rilati kun la gvidanto de la federacia kurso. Ankaŭ estis aprobitaj la raportoj de k-doj Chamarre kaj Cuillerdier pri informservo. El la unua ni citu la jenajn

# “Paca“ Oceano

*Demjan Bednij*

Kreita situacio donas al anglo-amerika diplomatio eblecon . . . garantii pacon en la Pacifika Oceano kaj ordon en Ĉinlando.

El la gazeto “Daily Herald“.

Estas ĉe Krilov agrabla
Pri vilaĝanoj unu fablo,
Ridige interparolantaj
Pri nun milit' venanta.
Ordonis caro-patro nia
Teon preni de Ĉinio.
Jen la kaŭzo por ke Fomo
Estu elŝirit' el domo.
Fomo estas ĉagrenata:
Milit' pro kaŭzo nekonata.
Iradis Fomoj, kiel ŝafoj,
Subigi fremdajn landojn per pafoj.
Surrampus ili planedojn aliajn,
Se aliro estus tien.
Nur sciis caro kaj estraro,
Kien peli la ŝafaron.
“Kio do? Ĉinio?
Estu tiel, rulu tien!“
Kie ja ne estas dissemitaj
Soldataj ostoj, kaj la cindro ventumita.
Mortadis Fomoj fidaj
Kaj Fomidoj
Ĝis ne delongaj jaroj.
Divenis fine la Fomaro:
Jen forpelinte caron al diablo,
Komencas amikecon kun Ĉini' agrabla,
Al kiu estis ĝi kaŭzinta barojn
En la mil naŭcenta jaro.
Jen estas ĉagrenata kio?
Malbona estas ĉe l' amiko io.
Sufokas ĉinojn gorĝ-rabistoj
Malbonaj pli ol caraj oficistoj.
Jen baraktiĝas en batal' ĉinanoj
Kun ĉi-anglan'-amerikanoj.
Kaj grakas Fomo kun kunsenta gesto:
“Jen burĝoj! Kaptu ilin pesto!
Ne donas ili al ĉinar' trankvilon.
Kial do ne kapti ilin,
Laŭ ni ekzemplo sendanĝera?“
Kaj fino estas de l' afero:
Vigligi volas Fomo la ĉinaron,
Sed *lingvo ĉina* — jen la nevenkebla baro!
Du vortojn havas Fomo tamen,
Fortegajn, batalemajn, famajn,
Tondrantajn per alvok' revolucia
Sur la popolo de Ĉinio.
Komprenas tutĉinaro vortojn tiajn.
Ili estas: Lenin kaj Rusio.

---

Jes! ne pace estas . . . en la “Paca“ oceano!
Spirito Moskva! Baro — Karaĥano!
Diras unu burĝo al alia, sopirante:
Malbona vento estas el Ŝanhaj' blovanta.
Ne transformiĝu vent' en uraganon. —
Jen, Jen vi havu . . . Pacan Oceanon . . .

---

Ameriko-anglaj ĉi-bonkoraj
Burĝoj estas, diodoraj!
Komencis la burĝaro
Delonge premon sur ĉinaro.
Flanke de l' firmtero, flank' de l' mar' premadis,
“Animojn ĉinajn ĝi savadis“,
Apartan manieron utiligis:
En religion kristan ĝi turnigis.
Lernejojn pastroj alsenditaj malfermadis,
Sensencan evangelion diradis.
En la unua vaporŝipo alveturas sanktaj oficistoj,
En la dua — komercistoj,
En la tria — por “la gardo“ soldataroj,
Ĉar estis tiulande “barbaroj“.
Sed ju pli oni ilin klerigadis,
Des pli la ĉinar' barbara krietadis,
Dum la spirito nevenĝema kaj sincera,
Homar' aspekton perdis en mizero.
Venenis pastroj ilin per opio religia,
Kaj komercistoj per narkot-opio,
Venenis unuj l' animon, korpon aliaj senpere,
Komunan kaj “kulturan“ faris ambaŭ aferon,
Per araneaj' duobla ĉinan landon ĉirkaŭvolvis
Kaj vejnojn poste de ĝi elvolvis.
Sed paca estis ĝemo de la sklav' — ĉinano
Sur bordoj de la “Paca“ Oceano.

---

Ne estas bildo pli ĉagrena.
Ni liberiĝis mem de l' ret' apenaŭ.
Ĉu memorigi? — Ĉiuj estas atestuloj,
Kiel anglo-amerikaj fanfaronuloj
Nin provis ja aljungi al Ĉinio.
Sed longa estus parolad' pri tio.
Je ĉevalaĉo ni montriĝis,
Kun ni grumblant' — akutemiĝo.
Ti-kuj ĝin enjungi provus,
Multajn dentojn perdi povus,
Forsalti kun rompitaj ostoj, —
Sed pri tio iel poste.
Nun dolĉiĝu ni per bildo pura!
Malantaŭ ĉina muro
Kvincentmiliona popol-giganto
Pace ĝis nuntemp' ĝemanta,
Punata per la vipo fera,
Ekmovis ŝultron ĝi kolere,
Per voĉo laŭtega kaj sentima,
Por burĝ-oreloj tiel malkutima,
Ektondris sen rezignacio:
“For de Ĉinio! . . . —“

---

La komenco estas grava.
Unua vort' eksonis brava.
Muskola mano kunpremiĝis.
Limtemp' ankoraŭ ne vidiĝas.
Sed longe ne atendu — uragano
Estos en la “Paca“ Oceano.

Trad. el rusa *B. Ŝaĥnoviĉ* (4543)

ciferojn: 49 tradukoj estis senditaj al proletaj gazetoj; 14 el ĉi tiuj enpresis sume 59 artikolojn, al kiuj ni devas aldoni 29 enpresigitajn de k-do J. M. Esp-o en anarkiista gazeto. La raporto de Cuillerdier koncerne la eksterlandajn rilatojn atentigas la diferencon inter la nombro de membroj de la nacilingvaj asocioj kaj de SAT; en kelkaj landoj ĝi varias de 1/5 ĝis 1/3; kontraŭe en fanclingvaj regionoj la proporcio estas normala, verŝajne ĉar F. E. O. restas sur la propaganda kampo kaj helpas la porpraktikan agadon de SAT. K-do Glodeau raportis pri la eldonfako. Koncerne la reeldonon de la "Cours Rationnel d'Esperanto" malfermiĝis debato pri la tendenco de tiu lernolibro; estis decidite fari kelkajn necesajn ŝanĝojn, konservante tamen ĝian klasbatalan spiriton. K-do Raguier preparos raporton pri eldona kooperativo; la demandon devas studi la grupoj. La nova statuto, kiu lokas F. E. O. sur propaganda kampo, estis aprobita unuanime. Informilo presata skribmaŝine estos sendata ĉiumonate al la membroj.

La sekretario *H. Cachon.*

## Vantaj promenetoj tra esperantaj gazetoj kun rezonkonsideroj pri diversaj aferoj

### 19. Polemiko kun amiko

Ordinare, kiam iu nomas sin "neŭtrala", ni jam certe scias, ke li ne estas nia, sed sub masko de neŭtraleco kaŝas malamikecon por ni. Kiu ne estas kun ni, tiu estas kontraŭ ni — kiomfoje ofte praviĝas tiu ĉi formulo!

Hodiaŭ estas unua fojo, kiam ni en neŭtralulo vidas amikon, "samideane kaj kamarade" simpatiantan al ni — s-ron redaktoron de la meksika "Arguso". En N-o 2—32 de sia gazeto li metas afablan artikoleton "Al Moskvulo" responde je nia "promeneto" en N-o 13 de "Sennaciulo".

Ĉar la afero estas tre interesa, ni provu detale analizi la pozicion de "Arguso". Ĝi skribas:

> "Inter la malgranda meksika esperantistaro estas ĉiuspecaj religie aŭ socie kredantoj. «ARGUSO», ilia organo, devas labori nur por esperanto . . ."

Ĉu prave? Estante "neŭtrala" al tiuj grupoj, "Arguso" estas malproksima al ili ĉiuj, ĉar ĝi povos kontentigi neniun el ili, kiel decus, kaj gajnus neniun el ili por meti nian lingvon sur firman teron. Kontraŭe, se "Arguso" fariĝus servanto de certa grupo, de certa ideo, tendenco — tiam certe ĝi povus plene almiliti ĝin, tuŝante ties plej intimajn interesojn. Tiam Esperanto starus tute firme almenaŭ per unu piedo, ol nun — ne havante iun difinitan apogon.

Ni konstatas, ke tia nedifinita, "neŭtrala" pozicio de "Arguso" metas ĝin en tre konfuzan staton. Ĝi skribas:

> "Vi komprenas nun ke unu afero estas la revuo, kaj tute alia la ideoj de ĝiaj redaktoroj . . ."

Ne — malfeliĉe, ni ne komprenas. Ni tre petas afablan pardonon, sed por ni tia afero estas absolute ne komprenebla. Tion ni sincerege konfesas. Eĉ pli — ni opinias, ke "Arguso" mem ne estas escepto; ĝi estas tute klara portreto de siaj mastroj. Tion ni ekvidis de la komenco mem, ni instinkte kaptis malklaran heziteman signon de simpatio al ni — kaj nome tial ni skribis por "Arguso" kuraĝigon kaj saluton.

Ni volas ankaŭ nun aldoni kelkajn rimarkojn por helpi al la red. de "Arguso" trovi sin mem.

Unue: Se li estas meksik(ian)o, amante Veron kaj Justecon, kaj se li kredas, ke lia lando reprezentas tiujn bonojn, — tiam li fakte defendas nome ilin, sed — ne la patrujon. Se ni scias, ke nia patrujo reprezentas malbonon, ni estas tiam kontraŭ la patrujo.

Due: Se li perlaboras la panon penege el la dekdua jaro de sia vivo kaj tial iĝis socialisto kaj evoluante konstante, li vere ne scias kio li estas nune (laŭ sia propra konfeso), — ĉu socialisto, ĉu reakciulo, — ni devas diri, ke li sekve travivas tre danĝeran periodon, de kiu dependas lia plua idearo.

Trie: Certe, ĉiu popolo havas bonecojn, kaj se li pro tia ideo rifuzis partianiĝi dum la mondmilita buĉegado, li certe estas prava. Sed tio ne signifas, ke eblas rifuzi partianiĝi en la tutmonda klasbatala buĉegado (multe pli terura kaj maljusta, ĉar ĝi estas ĉiutage vivsignifa, hipokrite perfortata, trompoplena kaj sufokiga) kaj batali por bonecoj de ĉiuj popoloj kontraŭ ĉiupopolaj malbonecoj. Ne eblas neŭtraliĝi tie ĉi, ĉar la manlavantaj Pilatoj nur akcelas krucumon de la justuloj.

Tutanime ni konsentas la konvinkon de la red. de "Arguso":

> "La mondo ne paciĝos ĝis multaj jaroj post ĝia akcepto de Esperanto" . . .

Sed ni ne povas konsenti ke:

> "Konsekvence, mi kredas ke nia unua tasko estas esperantigi la mondon. Poste la lumo venos por ĉiu" . . .

Ni tre petas afablan pardonon, sed por ni tia afero absolute ne ŝajnas esti konsekvenca. Laŭ nia kredo, nia unua tasko estas forigi kaj eble eĉ definitive ekstermi la objektivajn barojn por la vera socia paco (ne paco falsa sen socia justeco) tra la tuta mondo. Esperanto laŭ nia kredo ne estas tasko, sed nur unu el la rimedoj por iu tasko. Nenio pli. Ankaŭ la lumo neniam venos, se tiun lumon ni mem ne faros.

Konklude, ni volas respondi al „Arguso", ke ĉiuj artikoloj, precipe pri la laborulara movado, kiuj ne povas aperi en la organoj proklamantaj la sensencan devizon de la neŭtraleco, estas afable invitataj sur la paĝojn de "Sennaciulo", kiu ne estas ĝenata per la brido kaj direktilo de la adeptaro de la antaŭenrajdanta kapitalismo. *M.*


Ĵus aperis la **julia kajero** de

**Sennacieca Revuo**

kiel numero de originalaj verkaĵoj.
Kun famaj desegnaĵoj de k-do Shum

**Aĉetu ĉe Administracio de SAT!**


**Rekompencon**

mat. mi donos al tiu, kiu havigos al nesana Rejnlandano fraŭlo ian laboron korpe nestreĉan en Germanlingvio. Krome mi promesas, (se necese) progresigi nian movadon en la koncerna regiono, kien mi devos transloĝiĝi. Gek-doj, helpu! Pledu por mi! Bonvolu adresi al la redaktoro.


**TRI VERKOJ DE TOLSTOJ**

la ŝatata SAT-eldonaĵo

**fine ree estas havebla!**

Prezo 0,50 mk., 0,85 fr. sv.

**Administracio de SAT.**

LA LIBRO POR ĈIUJ

**PETRO**

KURSA LERNLIBRO POR LABORISTOJ

64 paĝoj. Kun ilustraĵoj.

Tute simple kaj kompreneble por ĉiu estas priskribata per 30 mallongaj ĉapitroj la vivo de laboristo, komencante de lia infaneco kaj kondukante trans ĉiujn malfacilaĵojn de laborplenaj vivjaroj ĝis lia morto.

**En venonta numero ni sciigos la prezon kaj liverkondiĉojn.**

Eldona Kooperativo de SAT    Administracio de SAT


Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG